

KOMENCANTO 4⁹⁸

gazeto por komencantaj esperantistoj kaj komencantaj aŭtozoj

redakcie

Karaj legantoj!

Denove pasis ses semajnoj. La redakcia teko daŭre pleniĝas per diversaj kontribuoj internaciaj, nun ĉe ekstremaj punktoj geografiaj — ek de Anglio ĝis Ĉinio.

Ĉi-numere ni lanĉas serion de eseoj pri Esperanto en radiofonio.

Stefan Maul, fondinto de "MONATO", prezentas sian revuon.

En gramatika parto ni daŭrigas rubrikon "LINGVAJ RESPONDOJ", kiujn faris mem *Ludoviko Zamenhof*, iniciatoro de Esperanto. Ĉi-foje rakonto pri landaj nomoj.

El Londono *Bill Thorne* daŭre kontribuas — nun per desegnaĵoj.

Kun granda plezuro ni donas nian spacon al *Jian Weijian* el Ĉinio, kun saĝaj kaj spritaj ĉinaj fabletoj.

El Francio kursgvidanto *Ginette Martin* sendis rakonton de sia e-lernantino pri festo de printempo en ŝia urbo.

Denove en nia gazeto aperas aforismoj, de *Peter Miles* kaj *Ĵanalieva Zuhra*.

Sur la lasta paĝo vi trovos tradiciajn adresojn por korespondi.



KOMENCANTO

1998 numero 4
fondita en 1992
8 numeroj jare
redaktas kaj eldonas: Viktor Kudrjavcev
konstanta kunlaboranto:
Rafija Jafasova
adreso: 620041, Ekaterinburg,
ab. ja. 132, Ruslando
abontarifo por 1998:
internacia tarifo:
24 nederlandaj guldenoj aŭ 12
usonaj dolaroj
orienteŭropa kaj latiname-
rika tarifo:
10 usonaj dolaroj
konto ĉe UEA: **vkud-a**
ruslanda tarifo:
32 рубля (за 8 номеров в
год) простым почтовым
переводом на имя Кудряв-
цева Виктора Васильевича:
620041, Екатеринбург, аб.
ящ. 132

PERANTOJ de**KOMENCANTO**

laŭ ĉi-subaj adresoj vi povas
aboni nian gazeton

ĈEĤIO

Vladislav Hasala, A.Dvoráka 1,
CZ-696 62 Strážnice

ESTONIO

Virve Ernits, Mahla 65 — 1, EE
— 0012, Tallinn

ITALIO

Višnja Brankovič, Via Leghissa
6, IT-34131 Trieste

POLLANDO

Maciej Wnuk, Skrytka 105, ul.
Broniewskiego 77-137,
PL-01-865 Warszawa

SVEDIO

SEF, Lisbet Andréasson, Södra
Rörum pl 455, SE — 24294
Hörby

SVISLANDO

Christoph Scheidegger, Im
Schleedorn 6, CH — 4224
Nenzlingen

UKRAINIO

Dmitrij Cibulevskij, ab.skr. 9307,
UA — 310003, Ĥarkiv

Historiaj studoj de **K****Esperanto en radiofonio**

En la jaroj 1923-24 la uzo de Herz-
ondoĵoj rapide disvastiĝis tra la tuta
mondo, fondiĝas radiostacioj por celo
informa kaj koncerta. En 1925 preskaŭ
ĉiuj landoj posedis sian disaŭdigan
servon per radio - brodkaston. Tra la
tuta mondo vendiĝis milionoj da
riceviloj. Tuj la lingva malfacilaĵo frapis
la orelojn. Por Esperanto tio estis
mirinda kampo. Sur la flugiloj de
radioondoĵoj la lingvo baldaŭ disaŭdiĝis
en la tuta mondo. Ĝiaj klaraj simplaj
sonoj estis multe pli facile distingeblaj
ol la dubaj diftongoj kaj unusilabaj
vortoj de la angla lingvo.

En la unuaj monatoj de 1924, el
Victoria (Kanado), Newark, Cleveland
(USono), Boernemouth, Praha,
Moskvo, Meksiko, Hamburg disaŭdiĝis
Esperantaj prelegoj.

UEA decidis aranĝi pri tiu fako la
trian teknikan konferencon. Ĝi okazis en
Genevo aprile 1922 kun partopreno de
reprezentantoj el 40 radiotelefonaj
entreprenoj, svisa registaro kaj Ligo de
Nacioj. Nur triono de la partoprenantoj
komprenis Esperanton, sed pro la
facileco ĝi servis al 50% de ĉiuj
diskutoj.

La konferenco rezolucii:

"... rekomendas al ĉiuj radiostacioj
regulan momentan brodkastadon en
Esperanto almenaŭ unu vesperon
ĉiusemajne... ĉar tiu lingvo montriĝis
facila, klare aŭdebla kaj jam
disvastigita inter aŭdantoj"

La unua parolado el USono estis
aŭdata en Tokio. Ĝi estis salutparolo en
Esperanto. La japanaj esperantistoj tuj
sendigis radiogramon por danki siajn
amerikajn samideanojn kaj la japana
ambasadoro gratulis la esperantistojn
en Usono.

UEA eldonis Esperantan horaron
de eŭropaj radiostacioj kaj organizis
standon en la "Ekspozicio de radioa-
paratoj".

Dum la posta jaro 21 Esperanto-
kursoj regule disaŭdiĝis el 20 ra-
diostacioj de Eŭropo kaj Ameriko (10
germanaj, 2 francaj, 3 hispanaj 1
itala, 1 svisa, 1 brazila, 1 meksika, 1
usona) kaj 118 Esperanto-prelegoj el
50 radiostacioj en 19 landoj. Neniam
antaŭe nia lingvo estis tiom aŭdata.
Multaj miloj da lernolibroj disvendiĝis.

En 1924 fondiĝis la Internacia Ra-
dio Asocio por radioamatoroj sub
prezido de d-ro Corret, en 1926 ĝi
posedis sian organon la "Internacia
Radio-Revuo".

En 1925 okazis Kongreso de ra-
dioamatoroj en Parizo, kien venis 300
partoprenantoj, el Usono kaj Anglio
venis multaj junuloj. Lingvaj malfa-
cilaĵoj fuŝis la tutan kongreson. Oni
rekomendis Esperanton ĝis venos in-
ternacia interkonsento. "La inter-
nacia Kongreso pri Radio, konstatante
la malfacilaĵojn kaŭzitajn de la lingva
diverseco en internaciaj rilatoj,
rekomendas la studon kaj la uzadon
de Esperanto kiel helpa lingvo de in-
ternaciaj radiofonaj komunikoj kaj
disaŭdigoj..." Protokolaro de tiu kon-
greso aperis kun Esperanto-traduko.
Esperanto ricevis sian bapton kiel la
helpa lingvo de Radiomondo.

[Laŭ la "Historio de la lingvo Esperanto"]

Ĉar radio rekte rilatas al la am-
askomunikiloj, per tiu ĉi eseo ni
lanĉas rakonton pri la plej poten-
caj Esperanto-radiostacioj kaj Es-
peranto-redakcioj.

DANKON! Al s-rino *Julinha Zoraide Feijo Pereira* (Porto Ale-
gre, BRAZILIO) pro donaco 5\$ por
prospero de **KOMENCANTO**

La sekva numero de
KOMENCANTO aperos
la 15-an de julio 1998

Monato

Abono en Ruslando: 108 rubloj al
Госплан Газета Показовая,
620014, 46-кв. 162, Екатеринбург

**Gazeto, en kiu
raportas aŭtoroj
el la tuta mondo
nur en**

**Esperanto, sed
ne pri Esperanto.**

**La internacia
magazino por
internacia
publiko.**

**Jara abonkotiĝo
ekzemple en
Germanio
74 markoj.**

**MONATO – internacia magazino sendependa por
politiko, ekonomio kaj kulturo**

sendube estas unu el la plej gravaj, interesaj kaj prestiĝaj gazetoj en Esperanto. Sed unue: kio estas magazino? Ne *magazeno*, do granda vendejo, sed „magazino”; tio estas revuo kun aparta karaktero kaj specifa, relative strikta strukturo. Ekzemple ĝi havas klarajn rubrikojn, ne nur de la tri gravaj kampoj nomataj en la subtitolo, sed ankaŭ multaj aliaj kampoj de l' moderna vivo. Jen kelkaj tiaj rubrikoj: noticoj, leteroj, novelo, enigmo, ŝerco & satiro, turismo, kuirrecepto, poemoj, hobia, spirita vivo, lingvo.

Unika laŭ ĵurnalisma vidpunkto

Tamen, la plej rimarkinda eco de tiu ĉi gazeto estas, ke ŝajne ĝi estas simple ĉiutema revuo en Esperanto, sed ke tia revuo povas aperi nur en lingvo internacia, ne en iu etna aŭ tiel nomata mondlingvo, angla, franca aŭ rusa. Jen la plej gravaj principoj de MONATO, kiuj klare distingas ĝin kontraste al aliaj memdifinaj internaciaj magazinoj, ekzemple usona *Time* aŭ germana *Der Spiegel*:

- aperas nur originale en Esperanto verkitaj artikoloj, neniu traduko (escepte, tamen, ekzemple de citaĵoj, intervjuoj kun neesperantistoj aŭ dokumentoj);

- el iu ajn lando aŭ mondregiono raportas nur loĝantoj de tiu lando aŭ regiono, do ne eksterlandano kiu ne bone scias pri historio kaj kulturo de tiu lando;

- la aŭtoroj verkas ne por hejma, sed por internacia publiko, do prezentas temon tiel, ke ankaŭ leganto en plej fora lando ne havas problemojn kompreni la enhavon;

- la revuo estas absolute sendependa, do ekzistas nenia cenzuro, MONATO estas aperta (malfermita) por ĉies opinio, kvankam kompreneble aŭtoroj kaj re-

daktoroj respektas la etikan kodon de ĵurnalismaj principoj, formulitaj de Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio.

Kial MONATO havas tiujn ĉi principojn? Mi fondis la gazeton antaŭ nun preskaŭ 20 jaroj, ĉar kiel profesia ĵurnalisto mi spertis la problemojn de internacia komunikado helpe de naciaj lingvoj. La plej gravaj problemoj estas jenaj:

Raportas pri la plej diversaj mondpartoj eksterlandaj korespondantoj de inform-agentejoj. Tiuj ĵurnalistoj simple ne povas bone scii ĉiujn gravajn faktojn pri aliaj landoj, do laŭsisteme ili prezentas tre multajn aferojn erare. Krome, ili raportas por sia hejma (ekzemple usona) publiko, ne por internacia, do ĉion observas kaj priskribas per okuloj de ekzemple usonano. (Mi aparte mencias Usonon, ĉar la gravaj internaciaj inform-agentejoj estas usonaj.) Do la cetera mondo neniel povas ricevi objektivajn aŭ eĉ nur proksimume ĝustan bildon pri grandaj partoj de l' mondo.

Due estas la lingvaj problemoj: Eksterlandaj ĵurnalistoj ne scias indiĝenajn lingvojn, do bezonas tradukistojn aŭ aliras nur personojn, kiuj scias ekzemple la anglan lingvon – do nur iun eliton aŭ certan tavolon de tiulanda socio. Krome, pro tradukado en aliajn lingvojn, estiĝas pliaj multaj eraroj kaj misprezentoj.

Alternativa gazeto

Evidente do, gazeton kiu evitas la skizitajn (kaj multajn aliajn) erar-fontojn kaj falsaĵojn, oni povas produkti nur en neŭtrala lingvo, do en Esperanto, respektante la supre nomitajn principojn.

Kion tio signifas por legantoj de MONATO? Ili ricevas artikolojn, kiajn neniel ili trovas en sia hejma gazetaro, kaj eĉ se temas pri konataj aferoj, aŭtoroj de MONATO montras tute aliajn aspektojn kaj faktojn ol nacilingvaj komunikiloj. Krome en MONATO egalas la landoj, ne superregas la grandaj ŝtatoj. Do la magazino estas vera alternativa gazeto kaj vere internacia.

Tamen mi volas averti, ke la lingvo de MONATO ne estas simpla, ĉar oni ja traktas ankaŭ komplikajn temojn. Do vera komencanto certe ne povas legi sen vortaro apude. Aliflanke, kompreneble, MONATO estas ideala helpo por plibonigi siajn lingvosociojn.

Kaj la prezo? Nu, tia revuo, riĉe ilustrita, ne povas esti malmultekosta, sed oni ja ricevas altkvalitan egalvaloron: ĉiumonate revuon de 24 paĝoj A 4.

Petu prezojn por via lando de
MONATO, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140,
B-2000 Anwerpen, Belgio
ret-adreso: fel@agoranet.be

Stefan Maul, fondinto de MONATO

GRAMATIKO kaj GEOGRAFIO

La unuaj praktikaj demandoj pri la geografiaj nomoj aperas ĉe komencantoj kiam ili decidas korespondi. Esperantaj kaj aŭtentikaj geografiaj nomoj ofte tre proksimas kaj diferencas eble je unu litero. Kiel vere skribi la landonomojn? Ĉi-sube ni prezentas tabelojn el ĉiuj kontinentoj, (krom eble kelkaj ekzotikaj insuloj), kaj daŭrigas konatiĝon kun Lingvaj respondoj de L.L.Zamenhof, kiujn li donis al la Oficiala Gazeto, III, 1911, p.291. ĝuste pri tiu temo

EŬROPO	Kroatio	AZIO	Libanio	Ĉilio	Urugvajo	Lesoto	Svazio
Albanio	Latvio	Afganistano	Makao	Ekvadoro	Usono	Liberio	Tanzanio
Andoro	Liftenŝtejno	Azerbajĝano	Malajzio	Dominika	Venezuelo	Libio	Togo
Armenio	Litovio	Bahreĝo	Maldivoj	Res.	.	Malagaŝa	Tunizio
Aŭstrio	Luksemburgio	Brunejo	Mongolio	Gronlando	AFRIKO	Res.	Ugando
Belorusio	Makedonio	Cejlono	Nepalo	Gvadelupo	Alĝerio	Malavio	Voltio
Britio	Malto	Cipro	Omano	Gvajano	Angolo	Malio	Zambio
Bulgario	Moldavio	Ĉinio	Pakistano	Gvatemalo	Bocvano	Maŭricio	Zimbabvo
Bosnio	Monako	Fillipinoj	Saudarabio	Haitio	Burundo	Maŭritanio	
Ĉeĥio	Nederlando	Hindio	Singapurio	Honduro	Centrafrika	Maroko	AŬSTRALIO
Danlando	Norvegio	Hongkongo	Sirio	Jamajko	Resp.	Mozambiko	OCEANIO
Estonio	Pollando	Indonezio	Sudjemenio	Kanado	Ĉadio	Niĝerio	Aŭstralio
Finnlando	Portugaliao	Irako	Taĝikio	Kolombio	Eburbordo	Niĝerlando	Fiĝioj
Francio	Rumanio	Irano	Tajlando	Kostariko	Egiptio	Rvando	Franca
Germanio	Sanmarino	Izraelo	Turkio	Kubo	Ekvatora	Sanheleno	Polinezio
Grekio	Serbio	Japanio	Turkmenio	Martiniko	Gvineo	Santomeo	Novzelando
Ĝibraltaro	Slovakio	Jemeno	Uzbekio	Meksiko	Etiopio	Sejĉeloj	Kuka ins.
Hercegovino	Slovenio	Jordanio	Vjetnamio	Nikaragvo	Gabono	Senegalio	Okc. Samoo
Hispanio	Svedio	Kamboĝo	AMERIKO	Panamio	Gambio	Sieraleono	Papuo
Hungario	Svislando	Kataro	Argentino	Portoriko	Ganao	Somalia	Salomonaj
Irlando	Spicbergeno	Kazahio	Barbado	Paragvajo	Gvineo	Sudafrika	ins.
Islando	Ukrainio	Kirgizio	Bermudoj	Peruo	Kamerunio	Res.	
Italio	Vatikano	Korea Resp.	Bolivio	Salvadoro	Kenjo	Sudano	
Jugoslavio		Kuvajto	Brazilo	Surinamo	Komora ins.	Sud-Okc.	
Kartvelio		Laoso		Trinidado	Kongio	Afriko	

La tabelo de landnomoj estas preparita laŭ la Poŝatlaso de la Mondo, Kartografie, Praha, 1971

LINGVAJ RESPONDOJ PRI LA NOMOJ DE LANDOJ

De la komenco ĝis nun mi ĉiam uzadis la nomon "Egipto" ne por la lando, sed por la *popolo*; la landon mi nomadis "Egiptujo". Mi tion faradis ne pro nesufiĉa pripensado, sed tute pripensite kaj intence. En la *novaj* landoj (ekzemple en ĉiuj landoj Amerikaj), la lando fakte kaj morale apartenas ne al ia difinita gento, sed egalrajte al ĉiuj siaj loĝantoj; tial estas afero tute natura, ke tie la lando ne uzas por si (per *uj*) la nomon de ia gento, sed kontraŭe, ĉiuj ĝiaj loĝantoj uzas por si (per *an*) la nomon de la lando. Tute alia afero estis (kaj tradicie restis) en la landoj malnovaj: ĉiun pecon da tero okupis ia speciala gento, nomis la landon sia speciala genta proprajo kaj ĉiujn aligentajn loĝantojn aŭ ekstermis, aŭ permesis al ili vivi en la lando kiel " fremduloj "; tial la landoj malnovaj preskaŭ ĉiam portas la nomon de tiu aŭ alia gento, kaj en

Esperanto, ĝis la tempo, kiam ni havas nomojn pure geografiajn, ni tion esprimas per la sufikso *uj*. La apud-Nila lando en la tempo de sia plej grava historia valoro estis lando *antikva*, aranĝita laŭ la principo "lando apartenas al unu gento", ĝi sekve nepre devas havi la sufikson *uj*, por ke ni povu esprimi la tre gravan por antikva lando diferencon inter la gento-mastro kaj la gentoj-fremduloj; ni scias ja el la Biblio, ke tiu diferenco en Egiptujo estis tre granda! Ĉiuj *novaj* landoj, ne aranĝitaj laŭ la principo "lando apartenas al unu gento", neniam devas uzi la sufikson *uj*; ni devas sekve diri "Usono", "Kanado", k.t.p. Se mi dum longa tempo uzadis "Brazilujo", "Ĉilujo", k.t.p., mi konfesas nun, ke tio estis eraro. Ni povus diri, "Brazilo", "Ĉilo", k.t.p., tamen mi ne konsilas tion fari, parte pro tio, ke por la Slavoj kaj la Germanoj, kiuj al kutimiĝis al

"Brazilo", "Brazilen", "Ĉilec", la vortoj "Brazilo", "Ĉilo" ĉiam sonus kiel nomoj de *popoloj*, parte pro tio, ke la longatempaj uzitaj formoj "Brazilo", "Ĉilo" en la senco de *popolo* donus nun grandan konfuzon, se la samajn formojn ni uzus nun en senco de lando. Sed tute oportune eviti samtempe ĉiujn tri malbonaĵojn (t.e. eraron, kontraŭkutimecon kaj konfuzon) ni povas tre bone, se ni de nun uzados por la diritaj landoj la formojn "Brazilio", "Ĉilio"; kaj tiel mi konsilas agi. Tiel same ni neniam devas diri "Meksikujo"; ni devus diri "Meksiko", sed, por fari diferencon inter la urboj kaj la samnoma lando, mi konsilas fari tion, kion ni faris kun aliaj similcirkonstancaj landoj, t.e. nomi la urbon "Meksiko" kaj la landon "Meksiko" (kiel Alĝero-Alĝerio, Tuniso-Tuniso k.t.p.).

[fino sur la paĝo 7]

Tri Ĉinaj Fabletoj


(re)verkitaj de *Jian Weijian* en formo de libera rimaĵo, [la adreso sur la 8-a paĝo]

Lanco kaj Ŝildo

En foiro nun, armilisto stulta
vendas ilojn kun
hiperbolo multa.

Jen li prenas lancon:
"Ĝi povas trapenetri
tra ĉiu ŝildo!"

Poste prenas ŝildon:
"Ĝin povas trapenetri
neniu lanco!"



Kaŝi monon

X [Ikso] estis parvenuo,
gajnis mon-sumegon, kaj — komike -
enterigis ĝin por posta ĝuo.
Sed ankoraŭ timis li, ke
ĝin malkovros iu.
Do starigis li tabulon, skribis,
por ke ĉiu sciu:
"Tie ĉi ne kuŝas mono."

Sed najbaro lia — Y [Ipsilono]
baldaŭ la tabulon vidis,
ĝojis, fosis, kaj da mono ĉiom
prenis;
por ne suspektiĝi, skribis:
"Y [Ipsilono'] la monon ja ne ŝtelis."

50 paŝoj kaj 100 paŝoj

Malvenkinte,
trup' retretis,
teron cedis.
La soldatoj
por la viv' konkursis.


X [Ikso] kuris
50[kvindek] paŝojn;
Y[Ipsilono]
Jam 100 [cent] paŝojn.

Mokis X [Iks'] al
Y [Ipsilono]:
"He! Poltrono!"

Ni invitas kursgvidantojn el la tuta mondo igi siajn gekursanojn verki por **KOMENCARTO** !

Festo de Floroj

Unu el floraj konstruaĵoj



Ginette Martin,

kurs-gvidanto en Gérardmer,

[92, rue du Riant Coteau, F-88290, SAULXURES sur Moselotte, France]

Mi sendas por via revuo artikolon, skribitan de unu el miaj lernantinoj.

Marie-To Pierrel,

[11d, Rue Carnot, F-88400 GÉRARDMER, France]

En la urbo Gérardmer en Vogezoj en Francio okazas en Aprilo ĉiun duan jaron granda kaj bela festo de printempo. Per *jonkviloj* kaj *muskoj* oni fabrikas grandajn belajn konstruaĵojn. Multe da personoj dancas ĉirkaŭ ilin. Kaj multe da muzikaj grupoj paŝas kune en la stratoj. Multe da vizitantoj venas en la urbo por pasigi agrablan tagon. La urbanoj estas tute okupitaj por konstrui, ordumi feston, ricevi vizitantojn. La lasta festo okazis je la 26-a de aprilo 1998.

Leksina Ludmila,

(lernas koresponde ĉe Viktor Kudrjavcev)

[307800 SUDĴA, Kurskaja obl., Gonĉarovka, Lugovaja, 2a]

La tria kato




Foje vespere mi rigardis telefilmon en malluma ĉambro.

Subite mia edzo ekpuŝis min:

- Rigardu! — kaj mi ekvidis sur la tapiŝo tri katajn siluetojn. Tri?! Ne povas esti! Ni havas nur du katojn!

Ni ŝaltis lampon. Tuj la tria kato eksaltis tra la fenestreto. Tio estis la kato de niaj najbaroj. Kial ĝi venis? Ĉu, povas esti, televidilo de niaj najbaroj ne funkciis, kaj ilia kato volis rigardi "Santa Barbara"?

El nia *Bill* - galerio



Janalijeva Zuhra

[417018 Kazahio, Ural'sk, Agregatnaja, 16]

A Sano - ĝi estas ankoraŭ ne ĉio, sed ĉio sen sano estas nenio.

F



R Ĉu mi povos ludi pianon kiam mia brako resaniĝos? (Bill Thorne)
Jes! Sendube!
Bona! Mi ne povis ludi ĝin antaŭe!

I

Peter Miles, [Londona Esperanto-klubo, Fred Tallant Hall, 153 Drummond Street, London NW1 PB2, Anglio]

S

@ Sukceso estas ricevi kion vi volas, feliĉo estas voli kion vi ricevas

@ Ofte la plej bona metodo gajni estas forgesi poentumi

M

@ La bona afero pri egoismuloj estas ke ili ne parolas pri aliaj

@ Genio faras kion ĝi devas, talento kion ĝi povas



@ Bestoj estas tiel agrablaj amikoj — nek demandante, nek kritikante

@ Feliĉo kompensas per alto kio al ĝi mankas en longo

J

@ La cerbo estas mirinda organo. Ĝi komenciĝas je la momento de ellitiĝo, kaj senĉese ĝis oni atingas la oficejon

La ONDO DE ESPERANTO



La Ondo de Esperanto estas ĉiunmonata soci-kultura revuo. En ĉiu kajero de La Ondo oni povas legi beletron originalan kaj tradukitan, precipe tradukojn el la rusa lingvo.

Ekzemple, jam aperis tradukoj el Aleksandr Blok, Valerij Brjusov, Iosif Brodskij, Miĥail Bulgakov, Anton Ĉeĥov, Fjodor Dostojevskij, Nikolaj Gumiljov, Sergej Jesenin, Vladislav Krapivin, Miĥail Lermontov, Vladimir Majakovskij, Bulat Okuĝava, Boris Pasternak, Aleksandr Puŝkin, Aleksandr Soljenicin, Vasilij Ŝukŝin, Ivan Turgenev, Vladimir Vysockij kaj multaj aliaj.

Proveksemplero ricevebla kontraŭ 2 respondkuponoj aŭ kontraŭ poŝtmarkoj (5 rubloj) ĉe la redakcio: RU-620077, Jekaterinburg-77, ab. ja. 67, Ruslando.

LE TRAVAILLEUR ESPERANTISTE

La Esperantista Laboristo

LTE estas monata gazeto [12 paĝoj A4, 10 numeroj jare, kolora kovrilo] plejparte en esperanto sed kun kelkaj artikoloj en la franca lingvo. La enhavo de la revuo estas certe politika kaj polemika. Senlaboreco kaj sociaj problemoj.

La revuo aperas ek de 1912. Organo de Federacio de Esperantistoj Laboristoj,

[115 rue Beranger, F-92320 Chatillon, CCP 902-52 F Paris, fetesperanto@wanadoo.fr]

Redakcio: Gérard Réquigny,

[33 rue de Lorraine, F-93200 Saint-Denis, gerard.requigny@hol.fr]

Abonkondiĉoj 100Fr.

PRI LA NOMOJ DE LANDOJ *fino. Komenco sur la paĝo 4*

Nun restas la demando pri landoj *Eŭropaj*. Pli aŭ malpli frue venos eble la tempo, kiam ĉiuj Eŭropaj landoj ricevos nomojn neŭtrale geografiajn; sed tiel longe kiel ni uzas por ili nomojn de gentoj, ni devas ĉiam uzi tiujn nomojn kun la sufikso *uj*. Estas vero, ke ekzistas tri Eŭropaj regnoj, por kiuj la sufikso *uj* estas ne tute logika (Aŭstrujo, Belgujo kaj Svisujo), kaj se la Akademio trovus necesa anstataŭigi en ili la *uj* per *i*, mi tion ne malkonsilus; sed fari *propravols* escepton por tiuj tri regnoj mi al niaj verkistoj ne konsilus, ĉar la Esperantistoj jam tro forte alkitimiĝis al la ĝisnunaj, neniom ĝenantaj nomoj de tiuj tre gravaj kaj ofte citataj regnoj, kaj por fari rompon en tiu alkitimiĝo mi ne vidas ian gravan neceson. Ĉar la tuta esenco de lingvo estas bazita antaŭ ĉio sur *interkonsento*, tial komuna ĝisnuna uzado devas ludi en lingvo pli gravan rolon, ol seke teoria logikeco; oferi la unuan al la dua mi konsilus nur en tia okazo, se nia Lingva Komitato tion postulus.

Respondo 47, *Oficiala Gazeto*, 111, 1911, p.291

KORESPONDU!

Ĉiu kadro kostas 3 rublojn aŭ 2 Internaciajn Respondkuponojn
Por pagintaj abonantoj de "x" - senpage

Jian Weijian

22j., junulo, studento, kun ĉiuj landoj. Naturo, sciencoj, tradicio, folkloro, lingvoj ks

Tong fu zhong Lu,
Shi ba mu heng 4 Hao,
CN-510240 Guangzhou,
ĈINIO

Henribill

J.M. Junqueira
12 j., Interŝ telefonkartojn.

av. Anchieta 490-32
Centro.
CARAGUATATUBA
BR - 11.660 - 010
BRAZILIO

4 knabinoj kaj 5 knaboj
12-jaraj deziras. kor..
tutm.: muziko, sporto
legado, bestoj

Csilla Csöke (instruisto)
11. Rákoczi F.32
24321 Mali Idoŝ
JUGOSLAVIA

Johano P.

Vluchtman

pri ĉiuj temoj tutmonde
Olijvenstraat 1
NL — 6412 WK
HEERLEN
NEDERLANDO

Benjamin Grosling

52j., amika korespondado

4, Station Road
LEVENHAM
Sudburu, Suffolk
CO10 9QB
ANGLIO

Timur Ĥalilov

12 j., ŝatas legi, danci,
volas kor. tutmonde

P.O.Box 132
EKATERINBURG,
620041.
RUSLANDO

Aladino Hassanaly
korespondi tutmonde

9, Ec. Sabaddst
Ecthaer Ransis.
CAIRO
EGIPTIO

Rodrigo Braganza

20jaroj., korespondi
kun gejunuloj

Tanqui y de Agosto
RIOBAMBA
EKVADORO

Tony Solmon Ledrein
25 jara

9 rue des Linsons
35430
St - JOUAN
FRANCE

Timofej Dmitrievič

Šuvajev
emerito, konata ruslanda
esp-isto, por siaj geklubanoj
60 let Oktjabrja, 6-135
NIĤNEVARTOVSK,
Tjumena reg. 626440,
RUSLANDO

Ferdinand Simon

49 j., pri esperanto kaj
diversaj temoj

p.k.30, Bruxelles 22,
BE.1000,
BRUXELLES
BELGIO

M. Mehdi Noruzi

29j., fraŭlo, tradukisto el
eŭropaj lingvoj, muziki-
sto, pentristo, e-gastiganto

P.O.Box 838
ESFAHAN
81465
IRAN

M.Reza Tashakori

korespondi kun
Ruslando

P.O.Box 15875-7351
TEHRAN
IRAN

Gutmie Tilly

46 j. pensiulino, eks-
sekretarino

2 rue, de l'Épinette
22190
PLERIN
FRANCE

Esperanto-klubo

"ESPERO"

skribu al ĝia prezidanto
Genadzj Kurgun

Ja.Kupali, 54-64
BY-230010, GRODNO
BELORUSIO

Peter Bankholm

46 jara viro interesiĝas pri
vojaĝoj kaj diversaj
kulturoj

Ättekulagatan, 16
25361
HELSINGBORG
SVEDIO

Paul Foss

korespondi pri
bahaismo

2, Luxton street
BRISTOL
BS5 0HT
ANGLIO

Marzena Speczynska

f-ino, 16 j., korespondi
kun samaĝuloj

ul. Kraszewskiego, 4/59
PL. 87100
TORUN
POLLANDO

KORESPONDI... listo de dezirantoj korespondi
enhavas pli ol 45 adresojn Sendu vian anoncon por sen-
paga enpresigo; aldonu 2 Internaciajn Respondkuponojn,
se vi deziras ekzempleron. Lastan eldonajon vi ricevos
sendante unu IRK aŭ 10 adresojn de seriozaj esperantistaj
korespondemuloj el diversaj landoj.

R.MELO, 34, Avenue de Russie, FR.03700
BELLERIVE S/Allier, FRANCIO

INTERNACIA KORESPONDA ADRESARO

Direktas: s-ro *R.J.Zverina*, 5. kvinta 26, CZ-460 01 LIBEREC, ĈEĤIO.
Cirkulero de Eŭroregiona Esperanto-klubo en nordĉeĥa urbo Liberec. Pli ol 50 adresoj
ĉiunumere. Publikigo de adreso estas tute senpaga. Petu informojn ĉe la eldoninto.

